



PENSEO


N-ro 388

feb. / 2024

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Rita Mkrťĉjan (Armenio)



Mi konstruos etan domon

Mi konstruos etan domon
Etan domon kun ĝarde',
Fermos pordon por malbono,
Por malĝojo kaj ĉagren.

Malpermesos, ke eniru
Mian domon la malam',
La envio kaj malico
De animoj kun malvarm'.

En angul' de mia domo
Loĝos rond' de sunradi',
La muzik' plenigos ĉambron
Kaj belega poezi'.

En ĝardeno mia kreskos
Floroj dum la tuta jar',
Sur la branĉ' de arbo kantos
Gajajn kantojn la birdar'.

Se eniri provos ĝojo
Kaj fidela amikec',
Trovos mi plej belan lokon
En la dom' de estontec'.

En dometo ĉiam estos
Lok' aparta por la best'
Por la katoj, por la hundoj,
Por prizorgo kaj kares'.

Rimarkeblas eta domo,
Eta "mondo" de la pac',

Sed fermita restos pordo
Por danĝeroj kaj minac'.

Geamikoj, nur fidelaj,
Ĉe la tablo- gaja rid',
Interkompreniĝo vera
Diros – Ĝis nova revid'!

Mia eta domo fora,
Dom' de rev', de mia koro...



Moissej Bronshteyn (Rusio)



Al Gunnar, la karmemora

Degelas mia amikaro,
degelas
en la ĉiela blua klaro,
en foro,
kaj multe malpli mia mondo
nun belas,
kaj regas multe pli amaro
en koro,
ho jes, mi certas ke memori
ne ĉesos,
dum vivas mi, la karajn
vizaĝojn.
Pluvel' novembra plori
promesas,
kaj trista vento foliumas
la paĝojn...

Ni havas kvin manĝojn tage,
 krom aperitivaj drinkoj.
 Restadas eksterimage
 manĝado sen bona vin', kaj
 abunde servita tablo
 ĝojigas nin kaj ekscitas.
 Feliĉas ni, jes, kontentas ni, jes,
 se ĉe l' manĝotablo sidas.

Laboru, stomak' !
 Sukcesis la tag',
 se plenas vi , mia koro!
 Laboru, stomak' !
 Diet' estas blag' !
 Laboru, stomak', laboru !

Malsato ne estas frato,
 ni diru, eĉ ne kuzino,
 do manĝu ni sen kompato
 al nia stomaka sino.
 Jen plad' bonvenigas pladon,
 jen vino konjakon benas...
 feliĉas ni, jes, kontentas ni, jes,
 se nia stomak' plenplenas.

De l' strato aŭdiĝas krioj,
 ke nia popol' malsatas.
 Pri ontaj revolucioj
 la stulta plebaĉ' debatas.
 Misglutas ni la ĉampanon
 kaj diras, skrapante l' nukojn :
 —Hmm, se iuj ne havas panon,
 nu... ili do manĝu kukojn !



Facilas vivi,
 se premas nokte

neniu honto,
 neniuj pentoj,
 se oni pri vi
 diskutas dokte,
 se laŭdas mondo
 vin en konsento.

Facilas vivi,
 se viaj pekoj
 pardonon tujan
 de l' mond' ricevas,
 se povas drivi
 vi for de blekoj,
 ke via land' en
 kolapso kreas.

Tro pezas viv', se
 eĉ fremdaj pekoj
 animon vian
 skrupule lezas,
 se daŭras vice
 post peno pen', kaj
 ŝanĝas nenion –
 la viv' tro pezas!

Sed elektinte
 toleri l' pezon,
 la voĉon levi
 por la opono,
 vi savas vin de
 fal' en frenezon,
 ĉar certas ke vi
 servas al bono.

Jen rego de la frostego
 32-grada,
 jen beno por la promeno;
 mi, akurata,
 por horo de la laboro
 kurante,
 jam sentas, ke min atendas
 ekran' de
 humoro – la monitoro
 kun blanko

folia, logaĵo mia,
 kaj manko
 de tempo por longa tempo
 min spronas
 al proz', do l' mordanta frosto
 ja bonas!

Mi staras konsternite.
 Ricevis baton mi de
 la vintro triumfanta.
 Ĉu mi akceptu milde,
 ke grandas vundo kora?

Ĝarden' apuda — nuda,
 forfalis teren nub' da
 aspiro mia vanta,
 kiu en verdo nupta,
 en blanka ŝaŭmo flora

min gvidis primavere.
 Ja certe, ĝia ven' re
 ne eblas objektive
 ĝis nova juna marto
 post longa jarduono,

sed devon vivi triste
 forigas nun malgriz' de
 reala ir' envive
 kun iom da bonfarto
 por mi, la Bruna Ŝtono.

Wélington Rocha (Brazilo)



Promen' kun poezi'

Mia penso min kondukas
 en brakum' kun poezi'
 Al ĉielo ĝis la steloj
 kiuj ĝojsalutas nin

Neelteneble invadas
 tutan min jam emoci'

Mia brusto eksplodonte
 Kor' forsaltonte de mi

Poezio do proponas
 Promenon kun papili'
 Kiu preter ni flugpasas
 Kun arom' dolĉa post si

Adiaŭas ni la stelojn
 La novvojon prenas ni
 Trio en feliĉo iras
 Laŭ la nokta melodi'

Ĝis komenco de mateno
 Nin akompanas la lun'
 Sub aŭroririda beno
 Eke vekigĝas ni nun

Al la vivovojo tera
 Mi ekpaŝas kun decid'
 Ĉion dankas kun vol' vera
 Flanke de mi nun feliĉ'

Ebriulo kaj ŝnurdancistino

Finiĝis la tago sen signo celebra,
 kaj ebriul' kun vest' funebra
 ŝajnis ja Ĉaplino.

La luno
 kia mastrino de bordel'
 sopiris pri briloproksimo
 de forvelkinta stel'.

De l' nuboj
 ne povis kaŝi sin la ŝvel'
 post sorboj de torturmakuloj,
 kiel peze,
 meze
 de ĝi l' emblema ebriulo
 figestis sen ajna simulo
 al nokto de la land' .

Mia land',
 kun sonĝoj nur ke

tuj revenu la mil'
de ĝiaj filoj de l' ekzil',
ja, longas temp' sen festo...
Ploras
nia patri'
kvazaŭ patrin'
kvazaŭ Mariaj
kvazaŭ Klarisaj
sen konsol' kaj sen fin'

Al ni de nia kor'
sed kordoj feras,
malgraŭe ke l' dolor' inferas
la espero
iras sur ŝnur' en ekvilibra danco,
eĉ se laŭ ĉiu paŝ' la ŝanco
estos de falo nur.

Sen kur'!
Al dancistin' kun nom' espero
nek eta nek granda sufero
senigos ŝin je krur'...

l' ondoj l' venton reserĉantaj :
Senvent' – Ili desperantaj ,
ho ve , ho ve!

La vent' estas dancartisto ,
dancas re kaj re fajfade,
en turniĝoj kvazaŭrade:
Vento , ĉi dancofaristo !

Ángel Arquillos (Hispanio)



Kia belo!

Osta mano min karesis
Kaj plor-ĝemo tuje ĉesis.
Flustris ĉe mia orelo,
Dolĉa voĉo de Anĝelo.
Kia belo !
Akran sonon de tranĉilo
Aŭdis mi kun maltrankvilo.

Ĥore la homaro kantas,
dume, mia koro haltas.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Komenci paŝojn en la novjaro

Kiel kutime en la pasintjaroj,
ni komencas paŝojn ĉi-novjare
kun la espero de nova vivo
ĉiam plenanta je bonsano.

Ni lernis multon el la pasintjaroj
por bone vivi en ĉi tiu jaro.
Kaj ni devas sukcesi planti bonajn
semojn
por rikolti feliĉe en la venontjaro.

Komencante paŝojn ĉi-novjare,
ni rigardas al la ĉielo kaj preĝas,
kaj poste rigardas antaŭen konfide,
ke revoj realiĝos.

Luno brila

Luno brila, kiu lumigas la teron;
luno brila, kiu adiaŭas mallumon.
Vi anstataŭas la sunon, regas la ĉielon.
Vi aperas je vespera krepusko,
vi forlasas la teron je mateno.

Tiun ĉi nokton mi sidiĝas por vin ĉiam
atendi
ĝis kiam vi brilas kiel hieraŭ vespere.
Sed vi ne ekrigardas la teron.
Vi daŭre sidiĝas je la fino de la nuboj.

Luno brila, ĉu vi koleras kun mi?
Princino noktotempa, ĉu vi malĝojas?
Bonvolu paroli al mi, via amiko.
Eble mi povus kuraci vian koron.

Princino noktotempa, aŭskultu mian
peton.

Mi volas havi koran kunligon kun vi,
mi volas dividi ĉiun malfacilaĵon kun
vi.

Akceptu min kiel gardanton vian.

Mi ne iros el ĉi tiu atend-loko;
mi ne moviĝos al alia loko;
Mi vin atentos ĝis vi aperos.
Aperu por respondi mian peton
kun rideto, kiel signo de ĝojo.
Noemuti, Timoro, februare 2011

Erika Godó (Hungario)



La nova tagiĝo

La malhela vualo de nokto malrapide
malapris ekstere,
la matena lumo vekigigas brilante en la
mondo.
La birdoj kantas por saluti la novan tagon,
la bluo de la ĉielo brilas kiel la akvo de klara
lago.
La gutoj de matena roso dancas briletante,
la lumo de la nova tagiĝo kolorigas la
pejzaĝon.
La radioj de espero bele brilas en niaj koroj,
ĉar la nova tago enhavas novajn ŝancojn
ĉiam.

Taro de la drako

Jaro de la drako, fajro kaj flamoj,
ĝi alportas bonkorecon kaj kuraĝon al niaj
koroj.
Estaĵo ŝvebanta en la nuboj altaj,
liaj flugiloj brulas per ardanta fajro en la
ĉielo.
La ruĝa drako flugas super la nuboj,
poste ĝi plonĝas en la profundo de la
oceano.
Giaj okuloj brilas kiel forta radio de ardanta
suno,

ĝia fuma spiro estas kiel la mordanta vintra
vento.

Nia kuraĝo estu kaj fortu kiel koro de drako,
nia forto estu tiel granda kiel ĝiaj flugiloj.
La jaro de la drako alportas al ni pacon kaj
feliĉon,
kaj alportu bonŝancon kaj kuraĝon al homoj.



Ardo (Ĉinio)



Granda malvarmo

Jen estas la granda malvarmo,
mi akompanu vin per varmo.
Paseo foris en ventego,
printempo venos kun briz-ĉarmo.

Jadranka Miric (Serbio)



Ĝojan Novan jaron 2024!

Decembra nokto ĉi-jare
tre similas al jam pasinta jar'
kiun ni salutas tute de nia korar'
Bonvenon al vi Nova jar'!!
Estu prospera kaj sana en ĉiu par'!
Paco, amo regu en la Mondo!
Ĝuu en la venonta 2024
precipe en ĉiu Esperanto Rondo!!



Decembro

Decembra printempa veter'
milde karesas paserojn sur la ter'.
Hundoj kuŝas sur strato tutleĝere,
malantaŭ ili katoj pace dormetas
Jes, vere.

Dum homoj plenigas kafe-korton
kiel lacertoj evitas enuo-morton,

Malbonŝanculo

Pluvis senhalte,
tial mi restis en la domo.
En tia veter' pro deprimita animo alte
al mi plaĉis odoro de kukopomo.

Viruso kaptis min.
Nazkataron ĝenis ĝis la fin'.
Ho, kia malbonŝanco
dum novjara urba festo- danco!

Rapida resaniĝo:
nepre varma enlitiĝo,
poste trinkado de teo varma
por eviti tusadon sen ternado larma!

Elena Popova (Bulgario)



Kiel aromas nia terglobo

Kiel aromas fojno falĉita,
kiel odoras!...
Tiom da herboj amasigitaj
elligas spiriton.
La griloj prikantas la amon
por revemuloj
kaj la steloj invitas animojn
al vastoj senlimaj...
Nia terglobo kiel aromas!...
Kiel ĝi parolas sendorma!...

Kanto de unu floro

Mi estas eta floro,
sed mi kantas tutkore
la kanton de l'Universo.
Ĝi estas Amo kaj mi
portos ĝin al ĉiu koro.
Kredu min, kant' ĝi estas
kun vortoj malfacilaj,
sed ĉu estas Am' facila?

KRISTNASKA BENO

Steloj brilas forte –
por Kristnasko kantas.
Dian amon portas,
Dian vojon montras.
Kristnasko ja venas,
kaj Dio nin benas!
Kun la cerva sledo
aĝul' donacojn portas,
de radi' sanktigitaj,
de Dio benitaj.
Sonoras la sledo –
ni al Dio kredu!

Josefo BenDavid (Usono)



Poemo por niaj amoj

Iun nokton mi sonĝis, ke mi promenas apud
la plaĝo akompanita de Dio.
Dum la promenado, multaj scenoj de la mia
vivo estis projekciitaj sur la ĉiela ekrano.
Dum ĉiu el tiuj scenoj pasis, mi rimarkis, ke
piedspuroj formiĝas en la sablo.
Foje aperis du paroj da piedspuroj, alifoje
aperis nur unu paro da ili.
Tio ege maltrankviligis min, ĉar mi povis
rimarki, ke dum la scenoj, kiuj reflektis
malĝojajn etaĝojn en la mia vivo, kiam mi
suferis pro angoro, malĝojo aŭ malvenkoj,

mi povis vidi nur unu paro da piedspuroj sur la sablo.

Tiam mi diris al la Kreinto: “Dio, Vi promesis al mi, ke Vi ĉiam irus apud mi. Sed mi rimarkis, ke en la plej malfacilaj momentoj de la mia vivo estis nur kelkaj piedspuroj en la sablo. Kial kiam mi plej bezonis vin, vi ne iris apud mi?”

Kaj Dio respondis al mi: “La tempoj, kiam vi vidis nur paron da piedspuroj en la sablo, mia filo.... estis kiam mi portis vin en miaj brakoj.”

Ivanichka Magharova (Bulgario)



En vintra vesper’
paŝoj vekas silenton.
Ŝi jam foriris.

La nokto frosta.
Blanka kolomb’ sur kornic’.
Portas novaĵon.

Proksimiĝas nokt’.
Pado piedpremita.
Bonodoras te’.

Pluvas. Pluvombrel’.
Kato apud kameno.
Du tasoj da vin’.

Maro da sonoj.
Alvenas el senlimo.
Tenera nokto.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Je l’ nova jaro!

Je via san’ dum nova jar’!
Ektostu are aŭ en par’.
Prosperu, karaj, sed kun dec’.
Bonŝancu en la realec’.
Printemp’ jubilu post la frid’.

La neĝboruloj floru sen brid’.
Je via san’!

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Himno de juneco

Vent’ aŭtuna florojn de printemp’ sopiras,
en memor’ neforgeseblas la juneco.
Tempo sorĉon de sezonoj jam retiras,
en medito l’ vivon kultas mi laŭ deco.

Gloro himno de junec’ ankoraŭ sonas,
pasintaĵo tamen svenis velke flora.
Pasiplenan historion ni bonkonas,
primavero ne revenas tre priplora.

Mi aspiras pri tenera via rido,
renkontiĝon iam trovos ni denova.
Spite de grand-aĝo restas nia fido,
frua amikeco ĉiam freŝscipova.

Al Helen’

Ho, Helen’ al mi ’stas via bel’ koketa
kiel pasea Nicea velŝipo naveta,
kiu flosis jen tenere sur aroma maro,
kun l’ enua laca la migranto en amaro
al dista denaska bordo silueta.

Delonge mi kutimis migri sur la muĝtorent’.
Klasika vizaĝo via kaj la hiacinta haro
kun feina gracieco portis min laŭ vent’
hejmen al gloreco, kiu estis Grekio,
kaj al grandiozeco, kiu estis Romio.

En tiea la fenestra niĉo brila
mi vin vidas kiel belstatu’ trankvila.
En via mano lumas lampo flavagata,
Ho, feina Psiko el sanktlando adorŝata!
— Esperantigita laŭ la poemo „To Helen“ de la
usona poeto Edgar Allan Poe (1809 — 1849)

Hazardo

Mi estas blanka nuboj sur ĉielo,
okaze sternas min en via onda helo.
Ne estu surprizita nek ekzaltita,
palpebrume jam foriĝas spuro glita.

Ni renkontiĝas sur la mar' obskura,
oni sekvas propran vojon ja libere.
Vi povas memori, forgesi prefere,
lumon reciprokan de hazardo pura.

*Esperantigita surbaze de Xu Zhimo (1897 — 1931),
ĉina nuntempa fama poeto*

L' abio post Advento

Festis Advento,
l' abio ĝoj-fieris
kun pia sento.

Solenis moment',
l' abio glorimponis
en sankta silent'.

Festoj forpasis,
tagojn de januaro
oni ĝin lasis.

Sur rand' de strato
ĝi estas forĵetita
sen ajn kompatato.

En brula flamo
l' abio pentofaras
pri la vantamo.

*—laŭ metriko de japana hajko, inspirite de la
poemo "Advent" de Rainer Maria Rilke*



DONIKA DABISHEVCI



Ne ŝrumpu!

Malbonulo, vi..!
Kial vi tristas
Plumbe peza pro la silento?
Suneca mi ja estas
Ne nigra malbeno.
Nekonata povas esti
Nur la momento kiu oferis
Ĉi tiun sovaĝan allogon,
Freneze profundan.
Kial vi timetas?
Iutage, nek vi, nek mi,
Ne plu ekzistos,
Ni perdiĝos,
Ni malestiĝos.
Vi turniĝos al marĉejo,
Mi al la vulkana lavo,
Vi al impetanta torento,
Kiam mi brilos kvazaŭ ĉielarko,
Kvazaŭ ĉielarko multkolora,
ĝojplena!
Ne ŝrumpu,
Eksplodu, kvazaŭ sanga ŝpruco!
Lumigu mian koron,
Flamigu mian korpon.
Kaj jes: la Lipon!
Malforta estaĵo deziranta la
preĝon:
La Lipon!

Vi ekfalos

Vi povas konfuziĝi embarase,
Kiam mi vin flirtigos
Sed la papilioj, ĉirkaŭ la kapo, vin kaptunos
Vi menskaŝe allogiĝos
Vi ekfalos
Kvazaŭ rompita kastela ŝtono
Malsupren laŭdeklive vin mi lanĉos

Ruliĝanta...
Rigardu la lipojn miajn, sekiĝintajn
Por la tuta ĉi tiu soifo mi demandas elpagon

Vi cindriĝos

Vi estas brilanta,
Vi estas tutarde radianta
Sed vi tiel fera ne estos
Kiam al cindro vi turniĝos
Kvazaŭ granda kverko
Post la forta vento
Kiam vi ekfalos, vi ekkuŝos
Al miloj da teraj partetoj vi degelos
Mi alkutimiĝis eniri en la fajron
Turni al pulvoro kaj cindro ĉion
Kaj mi pretas forblovi ĉe vi tutan rabion
Timige kaj trankvile vin mi harbruligos,
Vampire vin mi knalos
Tute.

La lipon!

Mi alkutimiĝis sin fordoni
Ĝis la mortaj ungegoj
Min mi ellasos tutridete.
Glacion kun sango mi fandis
Ĉiam unu el tiuj, mi sukcesis gajni,
Frenezulo!
Mi donos spiron al vi,
Mi donos animon al vi,
Mi donos vivon al vi,
Al vi, silenta ŝtono,
Mi suneculino!
Ĉar mi volas la lipon,
Vi delikata estaĵo.
Mi volas la lipon,
Vi frenezulo!

Somnambulino

Malbonulo vi..
Niaj vojoj estas kruciĝintaj!
Vi ne povas eskapi de mia malbeno
Nek mi de via deziro
Oni jam selektis min,

Kiel celitan predon.
Somnambulino (kiom ne trafa)!
Sed vi igas min tute sovaĝa
Vi igas min mordi forte tiun lipon
Kaj dispecigi vian animon
Kaj ronĝi ĝisfine la randon de via kolo
La brakojn krucigi,
La korpon dentmakuligi,
Vin multpece dishaki,
Kaj palpebrojn movigi
Trinkante sangon kaj moston.
La ruĝaj okuloj nun,
Eklumas,
Ekfulmas,
Ĉar mi estas mem la diablo,
La malbono por vi.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El ĉina antikva poezio

Jiang Jie (?-?)

Neĝado ĉe l' rivero Jinxi

—laŭ melodio *Kanto pri umefloroj*

Ŝajne blanka mev' demandus al mi:
“Ĉu vi devas resti korpe sur rivero
aŭ elkore ermitiĝi pro neĝbaro?
Se vi volas resti kore kun sincero,
kial vi kuntiras viajn brovojn?”
Vent' frapetas kun libero
fenestrokurtenon kaj lampfajro
flagras glime en ŝancelo.
Mi rigardas mian ombron solan,
eksentante dezertecon en malhelo,
kaj ekmemorante pri paseoj
de vojaĝoj kun amikoj de fidelo.

Ĉu amikoj tiuj nun ankoraŭ restas?
 Ni iame promenadis en flormaro
 kaj remadis sur rivero kun salikbordero.
 Volas mi prisonĝi ilin laŭ detalo,
 sed mi vane songas songojn.
 Nun mi vidas sub malvarmvualo
 nur akvfluojn kaj nubaron grizan.
 Mia kapokvat-tuniko pro neĝfalo
 malsekiĝas trae ĝis la haŭto.
 Ve, neniŭ ĉagreniĝas en amaro
 pli ol mi en mens' kaj la vivo.
 La profunda nokto en lumpalo
 de fliranta neĝ', kaj umefloroj
 ja similas al ĉargreno mia en fatalo.

Li Bai (701-762)

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

Super arbaro fora ŝvebas funnebul'
 densdensa kiel la teksaĵo de velur'.
 Malvarmaj montoj en la vic' spalira
 sin sternas kun junverd' korŝira.
 Krepusk' invadas l' etaĝdomon fola,
 tie en buduar' ŝi ĉagreniĝas sola.

Sur jada ŝtupo en silento
 mi staras kun aspira sento.
 Hasteme flugas birdoj are
 por neston reveni senbare.
 Sed kie por mi l' voj' revena ?
 Nur sin etendas poŝta kurso ĝena.

—laŭ melodio *Memoro pri placa knabino*

Flutsonoj jam formortis.
 Kiam vekigis ŝi el la songsfere',
 ŝi vidis super l' etaĝdomo
 nur la malvarman lunon en brilhel'.
 La luno super l' etaĝdomo,
 ĉu vi jam vidas el la blu-ĉiel'
 disiĝi homojn kun ĉagreno
 sub salikarboj en larmplena kver'.

Ascendas ŝi altaĵon platan
 ĉe la Mont-grimpa Tago nun.
 De fore ŝi rigardas al la vojo

malklara en nebula fum',
 lamentas, ke li nek aperas
 nek sendas voĉon per skrib-plum'.
 Susuras vent' kaj malantaŭ l' reĝajn
 palacon, tombojn sinkas sun'.

Li Jing (916-961)

—laŭ melodio *Silk-lava roĵo (longigita tonalo)*

Levinte l' kurtenon kun perla ornam',
 kroĉinte ĝin al la hokparo arĝenta,
 mi staras sur alta l' turetaĝo jam
 kun sama ĉagreno jen kiel antaŭe.
 Kiu estas maestr' de l' falanta folio
 ŝvebanta en vento dispela?
 Mia penso vagas pro la nostalgio.

Bluverda la bird' ne alportas leteron
 trans nuboj de l' homo en foro.
 Lilako en pluvo perdigas esperon
 al mi, sed la spleno min ŝlosas.
 Turninte la kapon, mi vidas vespere
 riveron inter tri gorĝegoj rapide
 torentas kvazaŭ deĉiele.

—laŭ melodio *Silk-lava roĵo (longigita tonalo)*

Lotusfloroj tute falas
 kaj folioj verdaj velkis nun.
 L' okcidenta vent' spiralas
 tra smeralda ondbrakum'.
 Bela la vidaĵo fuŝe palas
 kune kun apreca forkonsum'.
 Kia vea zum'!

Pluvo falas delikate,
 jen vanuis songfabel' en for'.
 Je l' ario lasta flutmuziko fade
 en la domo ŝvebas kun angor'.
 Mi pensante pri pasintaĵoj staras
 balustrade
 kun okuloj larmoplenaj en ĉi hor'.
 Kia ĝena rememor'!

—laŭ melodio *Senlima kiel la ĉielo*

Lunark' ekbrilas sur spegulo
jam je unua lumo de mateno.
Ŝi pigras en tualetado sen plezuro,
ne portas kap-ornamon kun volonta emo.
Ŝi sidas nun ja kun kor-torturo
en buduaro kun pendantaj murkurtenoj.
Falintaj floroj dancas jen en vent-susuro,
jen kaj jen ŝin atakas sento de ĉagreno.

Ĉe l' bord' kun salikarboj, herba pado,
ĉe put' kun vinĉo iris en promeno
li kaj ŝi, sed la sonĝ' pereis sen kompatio.
Lastnokte ŝi vekigis el ebria ĝeno,
en nokt-mallum' ŝin rodas la sortbato.
dolora pli al ŝi printempa ĉagreno
tre multe ja ol la malsan-invado.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

En valo

—laŭ ĉinesko *Ondo lavas sablon*¹

En profunda val'
verda herbar'
sin banas en sunlumpal'
kvazŭ tapiŝo bela
ja sen rival'.

Fluetas kanal'
direkte al
montpiedo sen bar'
lirlante l' tutan vojon

kun glima klar'.

Bonas pura aer'

—laŭ ĉinesko *Papilio super floroj*²

Inter tero kaj ĉiel'
ja plenplene
regas atmosfer'
utila al spirliber'
kaj planta kreska prosper'.

Tre gravas pura aer'
al la homar',
al nia vivsfer',
al la produktiva ter',
al klara sunluma hel'.

Papilia amo

—laŭ ĉinesko *Papilio*³

Li ŝin amas arde kun pasio,
sed dronas
en anksio.
Belas am'
sed male
la konscio
jen diras
ke ŝi nur 'stas ŝio.

Ŝi, nu, flugas kiel papilio
leĝere
en julio
de viro
al viro
kun manio.
Ŝi agas
malgraŭ l' edza krio.

Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

Ĉina Valenteno

— laŭ ĉinesko *Flirta kanto*⁴

Amo,

amo
ardis kiel flamo.
Romantika ide'
ŝprucadis el pase'.
Sepa,
sepa:
Valenten' ĉinstepa.

* *La sepa tago de la sepa monato laŭ la luna kalendaro estas la ĉina Valenteno.*

En lunklara arbaro

— laŭ ĉinesko *Ondo lavas sablon*¹
En verda arbar'
apud la val'
kantas iu najtingal'
kun sorĉa melodio
de madrigal'.

Tra tiu forstmar'
kun luna klar'
mi vagas sur pad' sen bar'
ĝuante animpacon
laŭ ideal'.

— *de Yi Qiao, inspirite de l' poemo "En valo" de s-ro Vejdo, jen la mia laŭ la sama melodio.*

Jadranka Miric (Serbio)

Preĝu por la Mondo

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*⁵
La stelo
falas de ĉiel'
Ho, ekdeziru ion
laŭkrede! Estu bel'
paco kaj abel' !

Abelo
por ke protektu
ni naturon. Diru Ne al
milit'. Paco ekregu,
Ni ĝin prizorgu!

Terure
kiom da malam'.

Frenezigiĝis mondo. Ho,,
falas homo. Dia am'
kaj Dia varm'

savos nin!
Rememoru ni
kia estis pasintec'
sen amo, nur militi
nepre profiti!

Tamen mi
kredas ke oni
transsaltos altajn murojn.
Bricks* donis kredon al ni
vivi por mond' ĉi.

**Bricks aludas Brazilo, Rusio, Indio. inio kaj Sud-Afriko en la angla.*

Spiritaj perloj

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*⁵
Brietas
steloj sur ĉiel'.
Klara benita nokto.
Anim' plenas de miel'
spirita. Tiel

ni ĝuis
en tradicio,
korpe kaj spirite, jen,
kredo tra emocio
en familio.

Kristnasko,
Sankta Nova jar',
Dio anonciĝis. Ho,
viciĝas festa perlar'.
en ĉi Januar'

Animo
malfermiĝis ĉar
malfermiĝis ĉielo.
Dio anonciĝis! Par'
miras kun homar'.

Kredulo

gajnis forton por
elteni vivotentojn,
plue labori kun kor'
ĉagren' iru for!

1. *Ondo lavas sablon (ĉine: langtaosha): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 5,4,7,7,4 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)*

2. *Papilio super floroj (ĉine: dielanhua): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)*

3. *Papilio (ĉine: fendie'er): ĉina fiksforna poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa (x=senrima)*

4. *Flirta kanto (ĉine: Tiaoxiaoling): ĉina fiksforna poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

5. *Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



La rezulto de la silenta rezistado

Denove estas la mateno, denove tuta tago antaŭ la okuloj. Mi enspiras freŝan aeron, poste longe tusas fleksiĝinte. Tuskraĉinte mi iras al televidilo, ŝaltas ĝin. Mi sidiĝas sur la sofono.

—Ĉu vi iros hodiaŭ al laboro? —demandas mia edzino Monika.

—Mi ne iros, —respondis mi.

—Ĉu en via kapo io malbonas? Ĉu mankas klapo en via kapo? — miras ŝi.

Mi nur enspiris lante.

—Ĉu antaŭ longe vi tion rimarkis? — ekinteresiĝis mi.

—Ekde la unua tago, — ŝi rediris.

—Pro kio vi diris nenion pli frue? — ekkoleris mi. —Ni tiom da jaroj vivas kune!

—Kion vi permesas al vi?! — koleris Monika. — Vi okupiĝas pri balalajkoj. Labori vi ne volas, drinkadas, nenion vi scipovas, nenion kapablas.

Mi neniam volis labori, tamen mia edzino, mia Monika... Ŝi konstante klarigadis al mi, ke laboro estas utila. Necesa por vivteni familion. Tamen mi ne kredis... Tiutempe, antaŭ kelkaj jardekoj, mi laboris. Kaj kio sekvis el tio? En laborejo ni drinkis, multe ni drinkis, ke eĉ Soveta Unio ruiniĝis. Mi diras „ni“, ĉar mi unu drinkis neniam. Ni drinkadis ne pro la kaprico, ne pro tio, ke ni volis drinki. Ni drinkis pro tio, ke ni aspektu kiel veraj viroj. Eldrinkinte ni blasfemadis, kraĉadis, kriadis, interpuŝadis kaj interbatadis, parolis pri sporto kaj politiko— pri tio, kio havis nenian sencon. Ĉiutage mi stultiĝis pli kaj pli kaj baldaŭ mi iĝos neimputebla. Do, kion mi timu? Antaŭe tio nomiĝis silenta rezistado, kontraŭstaro. Kaj tio donis esperon. Mia edzino Monika diras, ke mi estas stranga. Tamen estas multaj homoj pli strangaj ol mi. Ni ŝajnis, ke ni amas unu la alian. Tio ne estas tre malfacile, gravas ne subiĝi al emocioj.

—Kion vi faros, se vi ne iros al laboro?,- koleris Monika. —Ĉu vi povas ion utilan plenumi? Almenaŭ la rubojn kolekti kaj forporti el hejmo.

Mi sidis sur la sofo kaj spektis televidilon— oni disaŭdigis lastajn novaĵojn.

—Ho, Mikaelo, Mikaelo. Kiel vi ŝanĝiĝis. Labori vi ne volas, drinkadas, Esperanton vi ne finlernis, restis vi eterna komencanto... Diru al mi. Nur ne mensogu. Pro kio?

Sulkiĝis mi kaj respondis:

—Pro tio, ke ...

Ĉi-momente mia penso komencis striki, lango — stumbli. Aperis la deziro eldrinki kaj serĉi la kulpajn, bati buŝaĉojn kaj frakasi fenestrojn. Tamen mi superregis min, levis la kapon kaj kuraĝe diris:

—Pro tio, ke mi estas stulta!

Mi ekploris, tamen, malgraŭ tio, mi obstine ripetis:

—Stulta! Vere mi estas stulta! Jes! Jes!! Jes!!!

Tiam ŝi demandis:

—Kiu kulpas?

—Vi ne komprenas... — mi respondis al ŝi.

Subite mi memoris; kvankam mia edzino ne estas pli saĝa ol mi, tamen ŝi tre bone posedas Esperanton. Sekve la aliaj kriterioj decidas sukceson. Mi mem ne komprenas, pri kio mi pensas, tamen mi scias, ke tio gravas.

— Kvankam mi estas stulta, viadire gapulo, tamen ankaŭ mi volas paroli Esperanton. Pro kio vi bone posedas Esperanton, sed mi —ne? —koleris mi.

—Mi ne diras, ke vi estas malsaĝa, stulta, -pravigis sin Monika. — Simple vi pigras.

—Do, pro kio vi edziniĝis al mi? — kontraŭatakis mi.

—Kiam mi ekvidis vin en la Esperanto kurso, vi estis simpatia, sprita junulo. Sed kiu povis antaŭvidi, Mikaelo, ke vi tiel ŝanĝiĝos, — bedaŭris Monika.

La avantaĝo, kiun mi sentis antaŭ mia edzino, estingiĝis, bonhumoro falis, la vivo montriĝis senseca. Miaj oreloj ruĝiĝis.

—Tiom da jaroj... ĉiutage... kune! , — mi apenaŭ eldiris.

En la profundo de koro mi sentis min kulpa. Mi ektremis. Nun mi ektimis vere. Kaj mi decidis: „Sufiĉas. Mi ne volas esti la ŝarĝo por mia familio“.

Mi aliris spegulon. Longe mi esploris mian bildon, ŝmacis per lipoj, turniĝis antaŭ la spegulo, palpebrumis per okuloj, pufis la vangojn, grimacis. „Ĉu li jam freneziĝis?“—ekpensis mia edzino. Ŝiaj manoj kliniĝis, la kuleroj falis el ŝiaj manoj.

—Kion?! — kriis mi. — Pro kio vi gapas ĉi tie?

—Mi nek gapas, nek... — ektimis Monika.

Mi nervoziĝis, eĉ okuloj miaj ruĝiĝis.

—Al vi ŝajnas, ke mi similas porkon?! —ne cedis mi.

—Ĉesu, Mikaelo. Vi tute ne similas... —timigita parolis Monika.

Mi ektremis, apenaŭ sin kontrolis.

—Kion mi similas? — ne ĉesis mi ataki. — Pro kio vi ne plu rigardas min?

—Pro kio mi rigardu? — konfuziĝinte parolis Monika. —Ni estas jam ne plu junaj.

—Sekve, mi jam ne estas simpatia?

—Simpatia, bela, — balancadis ŝi.

—Ne, vi diru veron!, — komencis ekscitiĝi mi. —Kio mankas al mi?

Monika paliĝis, en ŝiaj okuloj iĝis mallume. Mi diris nenion pli, ekrigardis ŝin strange. Poste mi aliris ŝin kaj forte kisis ŝiajn lipojn. Mi aspektis tre ĉagrenita, malgaja. Monika mankaresis mian kapon kaj, preninte mian manon, tiel milde, tiel bele diris:

—Miĉjo.... Mi neniam forlasos vin.

Mi levis mian kapon. Ŝiaj okuloj brilis, kiel dum la unua rendevuo. En mia koro io ekmoviĝis.

—Do, kion mi devas fari, de kio mi komencu? — kun espero demandis mi.

Monika surtabligis „Plenan Manlibron de Esperanto Gramatiko“, botelon da minerala akvo kaj diris: „Vi legu“. Poste ŝi forlasis ĉambron kaj ŝlosis pordon.

Mi tralegis tutan PMEG-gramatikon de la unua vorto ĝis la lasta. Tamen mi komprenis nenion. Ĉu tiu Bertilo komprenis mem, kion li verkis? Trinkinte akvon, mi komencis legi PMEG ankoraŭfoje. Ĉifoje traleginte mi iom komprenis.

Subite la pordo malfirmiĝis kaj eniris mia edzino.

—Do, Mikaelo. Vi diru, metinte la manon al la koro, ĉu tiu lernado donis al vi ion utilan? — tuj demandis ŝi. — Nu, ĉu vi komprenis, kion vi legis?

—Kiel mi povis kompreni, se neniu klarigis al mi, — mi aŭdigis min.

Mi parolis longe, tamen ŝajnis, ke ŝi ne komprenas min. Poste lumo malaperis kaj iĝis malhele, mi svenis kaj falis de sur la seĝo sur plankon.

.....

Sed kiam denove mi ekvidis lumon, mi aŭdis mallaŭtan voĉon de mia edzino.

—Doktoro, ĉu estas iu espero?

—La kriza aĝo. Li ne devis tion fari, sinjorino, —la kuracisto trankviligis ŝin.

—Necesis!, — kriis mi. —Mi lernos plue.

Tamen mi ne povis leviĝi kaj komprenis, ke mian krimon neniu aŭdas, ke mi apenaŭ movetas la lipojn.

—Li tre volis finlerni Esperanton, —parolis ŝi. — Komence la principoj malhelpis... Klereco... Kompreneble eĉ mankis la volo... Poste li mem sentis, ke la plej bonaj jaroj jam pasis... Mi plej kulpas, —ĝemis ŝi. — Ni devis lerni kune. Mi devis helpi lin.

—Neniu kulpas, — la kuracisto trankviligis mian edzinon. — Tiel devis okazi. Tro granda ŝarĝo. La sanstato li ne kontrolis. Amatoreco... Jen, kion signifas la soveta edukado kaj litova modesteco. Tamen ni havu esperon, — diris kuracito, adiaŭis li kaj foriris.

Pipi (Ĉinio)



Kia la semo, tia la rikolto

Kiam mi estis eta infano, mia avino rakontis al mi unu historion.

Jen estas la historio.

Antaŭ longe en tiu kaj tiu malgranda vilaĝo vivis paro da malriĉaj maljunaj geedzoj, tre bonkoraj kaj helpemaj.

Ili loĝis en kaduka dometo.

Kiam la printempo venis, hirundoj, trans montojn kaj riverojn, alflugis de lontanaj varmaj landoj. Paro da hirundoj, senlace transportante pecetojn da tero en sia beko, konstruis neston sub la tegmento de la dometo de la maljunaj geedzoj. Baldaŭ poste, la nesto estis bone farita. Ili nestis en ĝi, demetis ovojn kaj kovis.

Vidante, ke la paro da hirundoj gastis sub la tegmento, la maljunaj geedzoj sentis grandan feliĉon.

Post dekelke da tagoj hirundidoj unu tuj post la alia elŝeliĝis. La hirundo-gepatroj tuttage sin okupis ĉasante insektojn kaj ilin donante manĝi al la idoj.

Kun la tempo la idoj plenkreskis. Kiam ili havis plenan plumaron, ili devis lerni flugi. Komencis provan flugadon la unua, la dua, poste la tria ... kaj

fine la kvina. Sed bum! oni ne scias kial tiu lasta falis teren kaj rompis unu kruron.

Tiu baraktis kun ŝiranta krio sur la tero.

Je tio, la maljunaj geedzoj alhastis, levis ĝin kaj enportis domen. Ili gepatris al ĝi samkiel al sia propra infano. La edzo kaptis insektojn kaj la edzino manĝigis ĝin.

Pasis tagoj post tagoj. La vundito resaniĝis sub la zorgado kaj flegado de la maljunaj geedzoj.

La aŭtuno alvenis. La vetero friskiĝis. Ĉiuj hirundoj ekflugis al la varmaj landoj krom la vundito, kiu, kripla je unu kruro, ne kuraĝis iri kaj flugi.

Unu tagon, la lama vundito subite ekbatis per la flugiloj. Kaj tuj poste ĝi ĵetis sin eksteren, pafiĝis nesciate kien. Tio ĝojigis la maljunajn geedzojn.

Sed ekster ilia atendo, tiu glisis returne, ĉirkaŭflirtis la geedzojn kelkfoje, kvazaŭ esprimante dankon al ili, poste velis suden kaj malaperis en la malproksimon.

"Bonan vojaĝon al vi, kara hirundo! Ĝis revido!" la geedzoj ĝojplene vokis kaj mansvingis en la direkton al la hirundo.

Post la aŭtuno venis la vintro. Kaj poste la frosta vintro finfine cedis al la varma printempo. Hirundoj reflugis norden.

Iun frumatemon, ĉe la aŭroro, la geedzoj aŭdis, ke io sonas ekster la fenestro. Estis unu hirundo, kiu beke frapas sur la fenestro.

La geedzoj senprokraste elkuris el la domo kaj vidis, ke unu hirundo kun semo en la beko lame paŝetas tien kaj reen sur la fenestro. Ili tuj rekonis en ĝi la vunditan hirundon per la lama kruro.

La edzino etendis la manojn al la hirundo. La birdo tuj flugis sur ilin, starinte kelkan momenton, elbekigis la semon sur la manplatojn, kaj kvivitinte tri fojojn, naĝis for.

Ĉe la vido de la semo, la edzino sufloris bonan ideon al la edzo: "Ĝi estas la semo de botelkukurbo. Ni semu ĝin ĉe la pordo, ni eble rikoltos grandan botelkukurbon!"

Tiu lasta konsentis: "Bone! Mi tuj semu ĝin!"

Post kelkaj tagoj, la semo ĝermis, kaj produktis kompletan viglan planton. Ĝi kreskis pli alten kaj

